

La Esperantisto.

Zeitschrift für die Freunde der Esperantosprache.

Herausgegeben unter der Mitwirkung des Dr. Esperanto (Dr. L. Samenhof) von Chr. Schmidt, Vorstand des Welt-sprachevereins in Nürnberg.

Erscheint monatlich einmal.

Zu bestellen auf der Post und in der Buchhandlung von Heerdegen-Barbeck in Nürnberg.

Preis 1 Mark für das Vierteljahr (durch die Post 1.15 Mk.).

Anzeigen werden angenommen zu 20 Pfennig für die Petitzeile.

Gazeto por la amikoj de la lingvo Esperanto.

Sub la kunlaborado de Dr. Esperanto (Dr. L. Zamenhof) eldonata de Chr. Schmidt, prezidanto de la klubo mondlingva en Nürnberg.

Eliras unu fojon en la monato.

Oni povas aboni sur la poŝto kaj en la librejo de Heerdegen-Barbeck en Nürnberg.

Kosto 1 marko por ¼ de jaro (per la poŝto 1 marko 15 pf.).

Anoncoj estas akceptataj por 20 pfenigoj por la petilinio.

Nr. 7.

Nürnberg, 25. April 1890.

1. Jahrgang.

Esperanto kaj Volapük.

(Daŭrigo.)

Restas al mi nun ankoraŭ analizi la lastan bonan flankon de Volapük — ĝian mallongecon. En tiu ĉi punkto, mi diras ĝin tute malkovrite, la Volapük staras absolute pli alte ol la lingvo Esperanto. Tio ĉi estas la sola batalilo, per kiu la Volapükistoj povas batali kontraŭ la „Internacia“. Sed ni analizu la veran signifon de tiu ĉi mallongeco de la lingvo. Ĉu ĝi estas ia aparta genia penso de sinjoro Schleyer? Ne, ĉiu, kiu volus krei ian artan lingvon, komprenas tre bone, ke la vortoj ne devas esti intence farataj longaj, se ili povas esti mallongaj. Ankaŭ la aŭtoro de la Esperanto deziris ke la vortoj en tiu ĉi lingvo estu la plej mallongaj kaj ke la esprimo de pensoj estu en ĝi almenaŭ tiel mallonga, kiel en la lingvo hebrea. Sed kelkaj tre gravaj aferoj malhelpis lin en la plenumo de sia deziro: la vortoj devis esti kompreneblaj, klare diferencaj en la parolado unu de la alia kaj bonsonaj, kaj la nombro de la vortoj ellernotaj devis esti la plej malgranda. Tiuj ĉi tre gravaj postuloj, kiujn la lingvo devis plenumi, jam absolute ne permesis doni al ĝi formon ideale plej mallongan. Sed por sinjoro Schleyer la diritaj leĝoj tute ne ekzistis, kaj tial ĝi estas tute komprenebla, ke li ne sole tre facile povis doni al sia lingvo pli mallongan formon ol Esperanto, sed li eĉ devis ĝin fari; ĉar se oni volas la vortojn tute arbitre elpensi aŭ prepari laŭ sia volo, ne estante premata de certaj leĝoj, tiam jam estus simple ridinde se oni elpensu vorton kelksilaban, provante fari vorton unusilaban. Esprimado longa estas efektive afero ne oportuna; sed vi povas tre facile vidi, ke en la lingvo Esperanto, malgraŭ ke ĝi devis obei diversajn tre gravajn leĝojn la esprimado tamen ne estas pli longa ol en la aliaj lingvoj vivantaj. Vere ke la Volapük esprimas la pensojn iom pli mallonge; sed restas ja la demando, ĉu por atingi la plej mallongan formon de la lingvo estas permesita oferi por ĝi ĉiujn aliajn efektive gravajn kondiĉojn de lingvo internacia? Mi forte dubas ke iu jesigus tiun ĉi demandon. Multaj Volapükistoj laŭdegas la mallongecon de Volapük kaj pro tiu ĉi ili pardonas al ĝi ĉion alian; sed se efektive lingvo internacia devas plenumi nur unu kondiĉon, havi la plej mallongan formon, tiam mi povas proponi al ili alian lingvon, kiu jam estas kreita, pli facile ellernebla ol Volapük kaj multe pli mallonga ol tiu ĉi: la plej mallonga lingvo estas la silento.

Sed ankaŭ tiun ĉi plej gravan econ de Volapük, la mallongecon, ĉu sinjoro Schleyer trakondukis ĝin sisteme? Oni povus ĝin tute certe esperi, ĉar se iu volas atingi en sia

lingvo nur la plej grandan mallongecon, tute ne premante sin per la formo de la vortoj, li povas ja fari ĝin tre facile, ĉar nenio estas pli facila, ol preni ian vorton kelksilaban kaj derompi de ĝi arbitre ĉiujn silabojn ĝis unu kaj ĉiujn literojn ĝis la plej malgranda nombro. Plenumi en la Volapük tute sisteme la kondiĉon de mallongeco estus ja eksterordinare facile, se tio ĉi estus efektive la klara intenco de sinjoro Schleyer, sed tamen li tiun ĉi kondiĉon tute ne plenumis sisteme. Tiel, ekzemple, kial sinjoro Schleyer la vorton „profesoro“ nomis „plofed“ kaj ne „plof“, kiu, estante egale ne komprenebla kiel „plofed“, estas ja tamen pli mallonga! Kial la vortoj „bi-li-ad“, „bi-li-et“ k. c. jam en la radiko havas tri silabojn? Se „elipso“ povis kuraĝe esti nomita „liped“ kaj la nomo de ĉiu tre malproksime kuŝanta insuleto sin ne kaŝis antaŭ la aŭtoro de Volapük kaj estis aŭtoritate transbaptita, tiam ankaŭ anstataŭ la trisilaba „biliad“ oni kun tiu sama rajto povus ja tute bone preni la unuan trovitan vorton unusilaban, kiel ekzemple „bom“, aŭ „bam, bum, plom, plam, plum“ k. c. Ĉio en Volapük ja estus tute egala! Kial inter la vortoj radikaj de Volapük sin trovas tiom da dusilabaj kaj trisilabaj, se el sole unusilabaj oni jam povis kunmeti grandegan vortaron, se la senco havas por la kreanto nenian signifon? (Prof. Bauer en sia „Spelin“ montris matematike, ke la nombro de la vortoj unusilabaj, kiujn oni povas krei per diversa kunmetado de la diversaj literoj, estas tiel grandega, ke la plej granda parto de la vortoj dusilabaj en Volapük povus kuraĝe esti anstataŭita per unusilabaj kaj la vortoj trisilabaj estas jam tute nebezonaĵoj.) Se la originala senco kaj la rekonebleco de la vortoj havas nenian signifon kaj nur la mallongeco de la lingvo estas grava, tiam estus ja multe pli nature, pli prudente, pli bonrezultate kaj ankaŭ por la aŭtoro multe pli facile krei la lingvon en la jena maniero: elskribi en alfabeto ordo ĉiujn eblajn kombinaĵojn unusilabajn, kiujn oni povas kunmeti el la diversaj literoj de la alfabeto, doni al ĉiu el ili ian signifon — kaj tiam ni havus riĉan vortaron el vortoj la plej mallongaj. Se la mallongeco estas la plej grava flanko de la lingvo, tiam ni povas diri, ke la vortaro de la Volapük estas konstruita tute sur malvera vojo, kaj ni povas nur bedaŭri, ke anstataŭ la Volapük sinjoro Schleyer ne kreis per la supre dirita maniero ian lingvon „Bum-bam“, kiu certe ne estus pli sovaĝa ol Volapük, sed por tio estus pli mallonga.

Nun ni revenu al la lingvo Esperanto. Mi jam montris, ke jam nun ĝi ne estas pli longa ol la aliaj vivantaj lingvoj, kvankam tro multe zorgi pri mallongeco ĝi ne povis, por ne kontraŭbatali kontraŭ aliaj flankoj de la lingvo, kiuj nun estas

multe pli gravaj. La nuna grandeco de la vortoj povas tute oportune resti en la lingvo jam por eterne, kaj mi pensas ke neniu sentos la bezonon ĝin plendi. Sed se oni trovas, ke la esprimado en Esperanto estas ankoraŭ iom pli longa ol ĝi devus esti ideale, tiam oni ne forgesu, ke sendube la lingvo nun la tempo iom ŝanĝiĝos, tiel same kiel ĉia alia lingvo. Post kelka tempo, kiam la lingvo estos jam ĉie enkondukita, tiam la facila ellernebleco kaj rekonebleco de la vortoj ne estos jam tiel grava; tiam oni baldaŭ komencos iom post iom enkondukadi kelkajn mallongigojn. Sed ĉu la maniero de esprimado devas esti iom pli longa aŭ iom pli mallonga, tio estas tia sensignifa demando, ke pensi pri ĝi oni povos nur post la paso de longa tempo, kiam la lingvo jam estos tiel enkondukita en la mondo, ke ĉiuj gravaj postuloj, kiuj nun estas farataj, jam perdos tutan sian gravecon. Sed tiu ĉi zorgado pri pli granda mallongeco jam estos ne neceso, sed lukso, ĉar kiel la legantoj povas vidi, la grandeco de la vortoj en Esperanto jam nun estas tia, ke ĝi povos tute oportune resti je ĉiam.

(Daŭrigo venos.)

La virineto de l' maro.

(Daŭrigo.)

Ofte en vespera horo la kvin fratinoj ĉirkaŭprenadis unua la alian per la manoj kaj suprennaĝadis en unu linio super la akvon. Ili havis belegajn voĉojn, pli belajn ol la voĉo de homo, kaj kiam ventego komenciĝis kaj ili povis kapozi ke rompiĝos ŝipoj, tiel ili naĝadis antaŭ la ŝipoj kaj kantadis agrable pri la beleco sur la fundo de l' maro, kaj petis la ŝipanojn ne timi veni tien. Sed tiuj ĉi ne povis kompreni la vortojn, ili pensis ke ĝi estas la ventego; kaj ili ankaŭ ne povis vidi la belajn de malsupre, ĉar se la ŝipo iris al la fundo, la homoj mortis en la akvo kaj venis nur jam kiel malvivuloj en la palacon de la reĝo de l' maro.

Kiam je la vespero la fratinoj tiel mano en mano sin alte levis tra la maro, tiam la malgranda fratino restis tute sola kaj rigardis post ili, kaj estis al ŝi kiel ŝi devus plori; sed virino de l' maro ne havas larmojn, kaj tial ŝi suferas multe pli multe.

„Ho, se mi jam havus la aĝon de dekkvin jaroj!“ ŝi diris. „Mi scias ke ĝuste mi forte amos la mondon tie supre kaj la homojn kiuj tie loĝas kaj konstruas!“

Fine ŝi atingis la aĝon de dekkvin jaroj.

„Jen vi elkreskiĝis“, diris ŝia avino, la maljuna reĝinovidvino. „Venu, kaj mi vin ornamos kiel viajn aliajn fratinojn!“ Ŝi metis al ŝi kronon el blankaj lilioj sur la harojn, sed ĉiu solieto de floro estis duono de perlo; kaj la maljuna avino elasis almodiĝi al la vosto de la reĝidino ok grandajn ostrojn por montri ŝian altan staton.

„Tio ĉi doloras!“ diris la virineto de l' maro.

„Jes, kortega ceremonio postulas maloportunecon!“ diris la avino.

Ho, ŝi fordonus kun plezuro ĉiun ĉie belegajn kaj deĵetus la multepezan kronon! Ŝiaj ruĝaj ĝardenaj floroj staris al ŝi multe pli bone, sed nenio helpis. „Adiaŭ!“ ŝi diris kaj levis sin facile kaj bele tra la akvo.

Antaŭ momento subiris la suno, kiam ŝi levis la kapon super la supraĵo de l' maro; sed ĉiuj nuboj brilis ankoraŭ kiel rozoj kaj oro, kaj tra la palruĝa aero lumis la stelo de l' vespero, la aero estis trankvila kaj freŝa kaj nenia venteto movis la maron. Sur la maro staris granda trimasta ŝipo, nur unu velo estis levita, ĉar estis nenia bloveto, kaj inter la ŝnuregato sidis ĉie ŝipanoj. Oni aŭdis muzikon kaj kantadon, kaj kiam la vespero fariĝis pli malluma, centoj da koloraj lanternoj estis ekbruligitaj; ĝi elrigardis kvazaŭ la flagoj de ĉiuj nacioj bloviĝas en la aere. La virineto de l'

maro alnaĝis ĝis la fenestro de l' kajuto, kaj ĉiufoje kiam la akvo ŝin levis, ŝi provis rigardi tra la klaraj vitroj de l' fenestroj en la kajuto, kie staris multaj ornamitaj homoj, sed la plej bela el ili estis la juna reĝido kun la grandaj nigraj okuloj. Li povis havi la aĝon de dek ses jaroj, lia tago de naskiĝo ĝuste nun estis festata, kaj pro tio ĉi regis la tuta tiu gajeco kaj belegeco. La ŝipanoj dancis sur la ferdeko, kaj kiam la princo al ili eliris, pli ol cent raketoj levigis en la aeron. Ili lumis kiel luma tago, tiel ke la virineto de l' maro ektimis kaj subiĝis sub la akvon. Sed baldaŭ ŝi denove ellevis la kapon kaj tiam ŝajnis al ŝi kvazaŭ ĉiuj steloj de l' ĉielo defalas al ŝi. Neniam ankoraŭ ŝi vidis tian fajraĵon. Grandaj sunoj muĝante sin turnadis, belegaj fajraj fiŝoj sin levadis en la bluan aeron kaj de ĉio estis vidata luma rebrilo en la klara trankvila maro. Sur la ŝipo mem estis tiel lume ke oni povis vidi eĉ la plej malgrandan ŝnuron, ne parolante jam pri la homoj. Kiel bela ja juna reĝido estis, kaj li premis al la homoj la manojn kun afabla ridetado, dum la muziko sonis tra la bela nokto.

Jam fariĝis malfrue, sed la virineto de l' maro ne povis deturni la okulojn de la ŝipo kaj de la bela princo. La koloraj lanternoj estingiĝis, la raketoj sin ne levadis pli en la aeron, la pafilegoj jam pli ne tondris, sed profunde en la maro estis movado kaj bruado. La virineto de l' maro sidis sur la akvo kaj balanciĝis supren kaj malsupren, tiel ke ŝi povis enrigardadi en la kajuto. Sed pli rapide la ŝipo kuris super la ondoj, unu velo post la alia estis levataj, pli forte batis la ondoj, nigra nubego sin montris kaj fulmoj malproksimaj ekbrilis. Terura ventego baldaŭ komenciĝis. Tial la ŝipanoj demetris la velojn. La granda ŝipo balanciĝis en rapidega kurado sur la sovaĝa maro; kiel grandaj nigraj montoj sin levadis la ŝaŭmanta akvo, minacante sin transjeti super la mastoj, sed la ŝipo sin mallevadis kiel cigno inter la altaj ondoj kaj levadis sin ree sur la akvajn montojn. Al la virineto de l' maro ĝi ŝajnis kiel veturo de plezuro, sed la ŝipanoj tute alie tion ĉi rigardis la ŝipo ĝemegis kaj krakis, la ĉefa masto rompiĝis en la mezo kiel kano, kaj la ŝipo kuŝiĝis sur flanko kaj la akvo eniris en la internajon de l' ŝipo. Nun la virineto de l' maro vidis, ke la ŝipanoj estas en danĝero, ŝi devis sin mem gardi antaŭ la traboj kaj rompaĵoj de la ŝipo, kiuj estis pelataj super la akvo. Kelkan tempon estis tiel mallumege, ke ŝi nenion povis vidi; sed jen ekfulmis kaj fariĝis denove tiel lume, ke la virineto de l' maro klare revidis ĉiujn sur la ŝipo. Ĉiu penis sin savi kiel li povis. La plej multe ŝi observadis la junan princon kaj ŝi vidis, kiam la ŝipo rompiĝis, ke li falis en la profundan maron. En la unua momento ŝi estis tre ĝoja, ĉar nun li ja venos al ŝi, sed baldaŭ venis al ŝi en la kapon, ke la homoj ja ne povas vivi en la akvo kaj tiel li nur malviva venos en la palacon de la reĝo de l' maro. Ne, morti li ne devas! Tial la virineto de l' maro eknagiĝis inter la traboj kaj tabuloj, kiuj kuradis sur la maro, forgesis la propran danĝeron, subnaĝis profunde en la akvon kaj sin levis denove inter la altaj ondoj. Fine ŝi atingis la junan princon, kiu jam apenaŭ sin tenis sur la supraĵo de l' sovaĝa maro. Liaj manoj kaj piedoj komencis jam laciĝi, la belaj okuloj sin fermis, li devus morti, se ŝi ne alvenus. Ŝi tenis lian kapon super la akvo kaj lasis sin peli de la ondoj kien ili volis.

Ĉirkaŭ la mateno la ventego finiĝis. De la ŝipo ne restis eĉ unu ligneto. Ruĝa kaj brilanta sin levis la suno el la akvo, kaj ŝajnis ke per tio ĉi la vangoj de l' princo ricevis vivon, tamen liaj okulaj restis fermitaj. La virineto de l' maro kisis lian altan belan frunton kaj reordigis liajn malsekajn harojn. Ŝajnis al ŝi, ke li estas simila je la marmora statuo en ŝia malgranda ĝardeno. Ŝi lin kisis kaj rekisis kaj forte deziris ke li restu viva.

Jen montriĝis tero, altaj bluaj montoj, sur kies suproj

brilis la blanka neĝo, kiel amaso da cignoj. Malsupre sur la bordo staris belegaj verdaj arbaroj kaj antaŭ ili staris preĝejo aŭ monaĥejo, estis ankoraŭ malfacile bone ĝin diferencigi, sed konstruo ĝi estis. Citronaj kaj oranĝaj arboj kreskis en la ĝardeno kaj antaŭ la eniro staris altaj palmoj. La maro faris tie ĉi malgrandan golfeton, en kiu la akvo estis tute trankvila, sed tre profunda, kaj kiu estis limita de superakvaj ŝtonegoj kovritaj ds delikata blanka sablo. Tien ĉi alnaĝis la virineto de l' maro kun la bela princo, kuŝigis lin sur la sablo kaj zorgis ke lia kapo kuŝu alte en la varma lumo de l' suno.

Eksonis la sonoriloj en la granda blanka konstruo kaj multaj junaj knabinoj sin montris en la ĝardeno. Tiam la virineto de l' maro fornaĝis kaj kaŝis sin post kelkaj altaj ŝtonoj, kiuj elstaris el la akvo, kovris la haroj kaj bruston per ŝaŭmo de l' maro, tiel ke neniu povis vidi ŝian belan vizaĝon, kaj ŝi nun observadis, kiu venos al la malfeliĉa reĝido.

Ne longe daŭris kaj alvenis juna knabino. Ŝi videble forte ektimis, sed nur unu momenton, kaj baldaŭ ŝi vokis multajn homojn, kaj la virineto de l' maro vidis, ke la reĝido denove ricevis la konscion kaj ridetis al ĉiuj ĉirkaŭstarantoj, sed al sia savintino li ne ridetis, li ja eĉ ne sciis, ke al ŝi li devas danki la vivon. Ŝi sentis sin tiel malĝoja, ke ŝi, kiam oni lin forkondukis en la grandan konstruon, malgaje subnaĝis sub la akvon kaj revenis al la palaco de sia patro.

Ŝi estis ĉiam silenta kaj enpensa, sed nun ĝi fariĝis ankoraŭ pli multe. La fratinoj ŝin demandis, kion ŝi vidis la unuan fojon tie supre, sed ŝi nenion al ili rakontis.

Ofte en vespero kaj mateno ŝi levadis sin al la loko, kie ŝi forlasis la reĝidon. Ŝi vidis kie la fruktoj de la ĝardeno fariĝis maturaj kaj estis deŝiritaj, ŝi vidis kiel la neĝo fluidiĝis sur la altaj montoj, sed la reĝidon ŝi ne vidis, kaj ĉiam pli malĝoja ŝi tial revenadis hejmen. Ŝia sola plezuro estis sidi en sia ĝardeneto kaj ĉirkaŭpreni per la brakoj la belan marmoron statuon, kiu estis simila je l' reĝido; sed siajn florojn ŝi ne flegis, kaj sovaĝe ili kreskis super la vojetoj kaj iliaj longaj trunketoj kaj folioj sin kunplektis kun la branĉoj de l' arboj tiel ke tie fariĝis tute mallume.

Fine ŝi ne povis pli elteni kaj rakontis al unu el siaj fratinoj kaj baldaŭ tiam sciigis ĉiuj aliaj, sed je vorto de honoro neniu pli ol tiu kaj kelkaj aliaj virinetoj de l' maro, kiuj tamen rakontis ĝin nur al siaj plej proksimaj amikinoj. Unu el ili povis doni sciaĵon pri la reĝido, ŝi ankaŭ vidis la feston naskotagan sur la ŝipo, sciis de kie la reĝido estas kaj kie sin trovas lia regno.

„Venu, fratineto!“ diris la aliaj reĝidinoj, kaj interplektinte la brakojn reciproke post la ŝultroj, ili sin levis en longa linio el la maro tien, kie sin trovis la palaco de l' reĝido.

Tiu ĉi palaco estis konstruita el helflava brilanta speco de ŝtono, kun grandaj marmoraj ŝtuparoj, el kiuj unu kondukis rekte en la maron. Belegaj orkovritaj kupoloj sin levadis super la tegmentoj, kaj inter la kolonoj, kiuj ĉirkaŭis la tutan konstruon, staris marmoraj figuroj, kiuj elrigardis kiel vivaj ekzistaĵoj. Tra la klara vitro en la altaj fenestroj oni povis rigardi en la plej belegajn salonojn, kie pendis multekostaj silkaj kŭrtenoj kaj tapiŝoj kaj ĉiuj muroj estis ornamitaj per grandaj pentraĵoj, ke estis efektiva plezuro ĉion tion ĉi vidi.

(Daŭrigo venos.)

Al la fratoj.

Forte ni staru, fratoj, amataj
Por nia sankta afero!
Ni bataladu kune tenadaj
Por unu bela espero!

Regas ancorau nokto sen luno,
La mondo dormas obstine,
Sed jam levighos baldau la suno
Por lumi, brili senfine.

Veku, ho veku, veku konstante,
Ne timu ridon, insulton!
Voku, ho voku, ripetadante,
Ghis Vi atingos aŭskulton!

Dekon da fojoj vane perdighos
La voko via ridata, —
La dekunua alradikighos,
Kaj kreskos frukto benata.

Tre malproksime chiu ni staras
La unu de la alia

Kie vi estas, kion vi faras,
No, karaj fratoj vi miaj?

Vi en la urbo, vi en urbeto,
En la malgranda vilagho,
Chu ne forflugis kiel bloveto
La tuta via kuragho?

Chu vi sukcese en via loko
Kondukas nian aferon,
Au eksilentis jam via voko,
Vi lacaj perdis esperon?

Iras senhalte via laboro
Honyeste kaj esperante?
Brulas la flamo en via koro
Neniam malfortighante?

Forte ni staru, brave laboru,
Kuraghe, ho, nia rondo!
Nia afero kresku kaj floru
Per ni en tuta la mondo!

Ni ghin kondukos ne ripozante
Kaj nin lacigos nenio.
Ni ghin traportos sankta jhurante
Tra l' tuta mondo de Dio!

Malfacileco, malrapideco
Al ni la vojon ne baros.
Son malhonora malkuragheco
Ni kion povos ni faros.

Staras ankoraŭ en la komenco
La celo en malproksimo, —
Ni ghin atingos per la potenco
De nia forta animo!

Ni ghin atingos per la potenco
De nia sankta fervoro,
Ni ghin atingos per la pacienco
Kaj per sentima laboro.

Gloru la celo, sankta l' afero,
La venko — baldaŭ ghi venos;
Levos la kapon ni kun fiero,
La mondo ghoje nin benos.

Tiam atendas nin rekompenco
La plej majesta kaj richa:
Nia laboro kaj pacienco
La mondon faros felicha!

Hemza.

Kanto de l' Ligo.

1. Fratoj, manon donu kore
Kaj senzorge, sendolore
Belan horon festu ni!
Ĉion teran forjetante
Daŭru forte kaj konstante
Nia bela harmoni'!

5. Al la Dio kantu gloron
La spiriton kaj la horon
Kial donis la ĉiel'!
Serĉi lumon per vereco
Serĉi virton per justeco
Estu nia sankta ĉel'!

3. Homoj en la oriento
Homoj en la okcidento
En la sud' kaj en la nord'!
Alte teni homan nomon
Kore ami ĉiun homon
Estu nia liga vort'!

Sciigoj de la provizora administra komitato de l' Ligo.

Sinjoro D^{ro}. L. Zamenhof sciigis nin, ke li forlasis Chersonon kaj loĝas nun en alia loko. La nova loko de lia konstanta loĝado ne estas ankoraŭ certe difinita, kaj tial li petas ke ĉiujn leterojn al li oni adresadu laŭ lia malnova adreso (D^{ro}. L. Zamenhof en Varsovio) kaj de tie li jam ricevas la leterojn en lia nova loko de loĝado.

Sinjoro T. el Westfalen alsendis por nia afero 200 (tricent) markojn germanajn, el kiuj la oferinto alfinis 100 markojn por la aŭtoro de la lingvo, kiel helpan parteton al multaj elspezoj, kiujli faris por nia afero, kaj 200 markoj por la kaso de la „Ligo Internacia de Esperantistoj“. Ni esperas, ke la ofero de sinjoro T. estos bona komenco por nia juna Ligo.

La klubo Esperanto en Nürnberg eniris en la Ligon kaj alportis al la kaso de l' Ligo 20 markojn.

La Esperantistoj volontaj partopreni en la fondiĝo de

klubo en Petroburgo por aliĝi al la „Ligo de Esperantistoj“ estas petataj sin turni al s-ro E. de Wahl, Universitato, Kolegio de Aleksandro II. La monata enpago estos almenaŭ 50 kop.

La nove fondita klubo en Šalke eniris en la Ligon kaj alportis al la kaso de l' Ligo 8 markojn.

Sinjoro M. S. Bogdanov sciigis nin, ke li forlasis Sofion kaj loĝas nun en la urbo Ajtos (Bulgarujo).

Ni petas ĉiujn amikojn, kiuj eldonis verkojn pri la lingvo internacia, ke ili volu sendi pli grandan nombron da ekzempleroj al la librejo Heerdegen-Barbeck en Nürnberg por la vendado en komisiono.

Peto al ĉiuj amikoj de nia afero.

La frazo: „Per malgrandaĵo oni povas gajni grandaĵon“, veriĝis tre ofte. Tial ni petas ĉiujn niajn amikojn en ĉiuj landoj kolekti la kasitajn poŝtsignojn kaj sendi ilin al la redakcio de tiu ĉi gazeto. La sumon, kiu ni ricevos el ilia vendo, ni uzos por la propagando de nia afero.

Respondoj al la amikoj.

Al sinjorino Maria Karovina en S. Petroburgo, s-roj Raŝkevs en Dünaburgo, Lorenc en Zbislavo, A. Filippov en Saratovo kaj multaj aliaj amikoj.

Mi ne havas tempon, tial mi sciigas Vin per nia gazeto, ke nia afero progresas bone tie ĉi kaj ke mi finigis la grandan vortaron anglan — internacian escepte la literojn C, P, S. La historio de la demando pri lingvo internacia ne estis publikata. Koran saluton.

Henry Phillips jr.
en Philadelphia 104 S, 5th Str.

Anoncoj.

La presejo de W. Tümmel en Nürnberg,

de kiu tiu ĉi gazeto estas presata, rekomandas sin por ĉiuj presa laboroj.

G. Zechmeyer en Nürnberg.

Plej granda komerco de la poŝtsignoj.

Ĉiuj kasitaj poŝtsignoj estas aĉetataj kaj ŝanĝataj.
Alle gebrauchten Briefmarken werden gekauft und umgetauscht.

Kiu interesas sin pro la

„Internacia Korespondado - Azociaciono“,

volu skribi al s-ro Schachno en Nürnberg, Josefplaco 19.

Peto.

Tiu abonantoj kiuj ĝis nun sendis la abonpagon nur por la monatoj Oktobro, Novembro kaj Decembro volu sendi nun ĝin por la dua kvarono de jaro de nia gazeto.

La redakcio.

Speziala instruado de LIBROTENADO kaj komercaj kalkuloj

per korespondado en lingvoj: rusa kaj internacia. La rekompenco estas tre modera. Prospektojn kaj provajn leterojn mi sendas al ĉiu, kiu sendos al mi unu poŝtsignon (de ĉia lando).

Mia adreso estas:

Julius Levik
Belaja-Cerkow (Kiev).

Senpage instruas la lingvon Esperantan
Vladimir Vladimiroviĉ de Majnov en S. Peterburg.